# Uzo de « ties »

**Ties** estas poseda rilatiga vorto. Ĝi signifas **de tiu** (de tiu= de li, de ŝi, de ĝi, de ili)
Do ĝi povas tute facile anstataŭi: **lia, ŝia, ĝia, ilia,** (tamen ***ties*** ne anstataŭas *de si,* nek *sian*, nek *sia*).

***Ties*** rilatas al **la laste dirita** (antaŭa ) **substantivo**, ne gravas ĉu tiu substantivo estas subjekto aŭ komplemento.

Sekve de tio: ***ties*** estas ripoziga por la cerbo kompare al lia, ŝia, ĝia, ilia.

**Ekzemploj:**

*Petro legas. Ties ĵurnalo estas interesa.*
*Mia kuirejo estas granda, ties plankon mi mem instalis.*
*La infanoj legas. Ties patrino estas kontenta.*
*Mi rigardas la katinon, ties vosto balanciĝas*

Dum en la supraj frazoj la uzo de **ties** ne estas necesa kaj ne estas ofta, en kelkaj aliaj kazoj ĝi estas tre **utila por forigi dubojn.**

*Mia patrino venis kun mia fratino, mi vidis ties blankan sakon.*
(En tiu kazo, estas klare ke estas la sako de la fratino. Se mi skribas *ŝia* oni ne scias, ĉu la sako estas de la patrino aŭ de la fratino)

*La kuracisto kliniĝis antaŭ la fremdulo, kaj laŭ ties deziro oni transportis lin en hospitalon.*
(En tiu kazo, estas klare ke estas la deziro de la fremdulo. Se oni skribas *lia,* oni ne scias, ĉu estas la deziro de la kuracisto, aŭ de la fremdulo.)

*****************************

## En kiu frazo *ties* forigas dubojn kaj estas la plej bona solvo?

Ĉe aliaj ebloj klarigu la diferencon en la signifo.

1. Panjo kuiras kokidaĵon. Mi ŝatas ties – ŝian – ĝian – odoron.
2. La hundo postkuras la katon. Ties – ĝia rapideco estas bone konata.
3. Panjo estas maltrankvila. Mi aŭdas ties – ŝiajn ve-spirojn.
4. Miaj gekuzoj renkontas amikojn. Ties – iliaj manteloj estas malsekaj.
5. Miaj gepatroj bone fartas. Ties – ilia sano estas bona.
6. Nina manĝas ĉe mi kun Renata. Mi ŝatas ties – ŝian robon.

**Solvo**:

**Ties** – forigas dubojn en la frazoj : du, kvar, ses.